KIEL AZENETO ALFABET LERNIS ESTIMI PLIAĜULOJN



Azeneto Alfabet iris laŭ vojo. Iris kaj ploris. Ĝin renkontis kaprido Marmelaĉjo kaj demandis:

– Kial vi ploras? Ĉu oni ĉagrenis vin?

– Ne. Neniu ĉagrenis min.

– Do, kio okazis?

– Avinjo forpelis min el la domo kaj diris, ke mi ne revenu, ĝis kiam mi lernos... estimi... pliaĝulojn... Sed kiel mi lernu, se nenie ekzistas lernejo por tio?

– Viŝu la larmojn, azeneto. Mi helpos al vi.

– Ĉu vere vi helpos?

– Vere, mi helpos. Vi devas memorfiksi kelkajn regulojn. Ĉu vi havas bonan memorkapablon?

– Mi ne plendas pri ĝi!

– Bonege! Do, memorfiksu: al pliaĝuloj endas cedi la vojon, tralasi ilin antaŭ vi, ne paroli kun ili krude, ĝentili, ne kontraŭdiri, ne frapeti iliajn dorsojn, kvazaŭ ili estus por vi egaluloj. Sed plej grave: ne forgesu sekvi iliajn konsilojn...

– Oj, kiom da reguloj! Kiel do vi sukcesis ilin ĉiujn memorfiksi?

– Mi estas bonedukita kaprido. Jen ĉio.

– Sed mi, laŭ vi, estas malbonedukita azeneto, ĉu?

– Ŝajne mi tute ne diris ion tian, – Marmelaĉjo konfuziĝis. – Sed por mi tempas iri.

Kaj ĝi rapide adiaŭis la azeneton por ne kvereli.

Azeneto Alfabet atingis laŭvoje la maljunan ĉevalon Hen, ŝargitan per diversaj aĉetaĵoj, kaj pensis: "Tuj mi kontrolos, ĉu la kaprido instruis min estimi pliaĝulojn." La azeneto aliris la ĉevalon kaj diris:

– Saluton, ĉevalo Hen! Ne timu, mi ne parolos kun vi krude. Nek frapetos vian dorson, kvazaŭ vi estus por mi egalulo.

– Sed kion krome? – la maljuna Hen ridetis.

– Krome, mi penos tralasi vin antaŭ mi. Kromkrome, se vi subite konsilos ion al mi, mi sekvos la konsilon.

– Bravulo! – Hen laŭdis. – Sed por kio vi parolas kun mi pri tio?

– Vidu, avinjo forpelis min el la domo kaj diris, ke mi ne revenu, ĝis kiam mi lernos estimi pliaĝulojn. Kion vi opinias: ĉu mi jam lernis?

– Preskaŭ lernis. Kaj mi mem diros tion al via avinjo. Sed ĉu vi volas, ke mi donu tamen al vi konsilon?

– Certe, mi volas!

– Sekvafoje, kiam vi renkontos maljunan ĉevalon, ŝargitan per diversaj aĉetaĵoj, helpu al ĝi porti ilin. Ĉu konsentite?

– Nepre! – la azeneto promesis. Sed poste ĝi pensis iomete kaj aldonis: – Ĉu vi permesas, ke mi helpu al vi nun?